RAPORTO DE LUSI HARMON, KOMITATANO "A" DE UEA AL LA ELNA KONGRESO EN TIJUANA, MEKSIKIO, 2007

Estas ege malfacile raporti pri mia laboro en la Komitato de UEA ĉar la laboro estas plejparte farita (krom dum la kongreso) per la reto. La ĉefa respondeco de la Komitato estas elekti la estraron de UEA. Tio okazos ĉiun trian jaron, kaj 2007 estas elekta jaro. Ĉijare okazis emociaj, kelkfoje malĝentilaj diskutoj pri la kandidatoj por Estraro de UEA..

La Elekta Komisiono (jam elektita de la Komitato) akceptas kandidatojn - rekomenditajn per almenaŭ tri membroj de la Komitato inkluzive du el aliaj landoj ol la propra. Tiam la Elekta Komisiono lomunikas kun la kandidatoj kaj preparas proponon de kandidataro kiu estas teamo da homoj kiu laboros por la komuna bono – per ekvilibra kombino de talentoj, reprezenta konsisto, kaj firma sento de kunlaborpreteco. La aliaj kandidatoj ankaŭ aperas en la raporto, sed la Komitato aŭ akceptas la Kandidataron proponitan de la Elekta Komisiono aŭ malaprobas ĝin. Se tio okazas, la Elekta Komisiono devas tuj refari aŭ proponi solvon.

Ĉijare estas akra debato pri kandidato kiu ne membras en la oficiala nacia organizo kaj fakte konkurencas kun ĝi. Estas komplike, kaj mi volonte klarigos al nia estraro aŭ membroj kiuj interesiĝas pri ĝi - kaj kiel mi intencas voĉdoni. Estas 76 Komitatanoj A, kaj duono devas esti tie por fari decidon.

Dum la UKoj, la Komitato kunvenas dum almenaŭ du tagoj kaj ankaŭ en subkomitatoj kiuj interesas ilin. Alie ni laboras en subkomitatoj kiuj proponas ideon al la estraro, subtenas aŭ kritikas ilin, ĝenerale agas kiel konsilantoj.

Diskuto dum la jaro okazos en la reto kaj estas preskaŭ ĉiam iom ĥaosa. Kelkaj membroj neniam uzas la reton. Kelkaj volas sendi tro da mesaĝoj kaj diskuti ĉion kaj plendas kiam aliaj ne reagas. Ekzemple; foje membro estis malkontenta pri decido de administranto de nacia oficejo (pagita de UEA), kaj li sendis paĝojn da plendoj, historioj, ideoj - preskaŭ ĉiun tagon. Li simple invadis la reton tiel ke ni ne povis eviti la plendojn, respondojn, daŭrigon de diskuto sen finfine bloki lin. Tio finfine estis decidita dum la Komitatkunveno en Florenco.

Kaj tre malmultaj sendas klarajn, kompreneblajn mesaĝojn: tro da akronimoj, tro da historio aŭ detaloj ne konataj de aliaj, tro da ne- logikaj ideoj. Kaj eble malmultaj scias kiel partopreni daŭran retan diskuton. Estis longega diskuto pri ĉu ni havu voĉdonojn rete. Spite al la fakto ke la ideo estis kiel eble pli "demokratigi" UEA, simple ne eblis veni al konkludo. Eble aliaj ĉesis diskuti ĉar ili opiniis same kiel mi, ke tiu ne necese pli demokratiigus UEA. (Mi planas proponi kelkajn teknikajn ideojn kiuj eble helpos. Ni frontas la samaj problemoj en ELNA kiam ni devas diskuti komplikajn aferojn - sed komparu dek-tri ELNA estraranojn al 76 Komitatanojen UEA!

Mi komprenas ke Esperanto estas speciala al ni ĉiuj, kaj pro tio ni ofte estas emociaj pri aferoj diskutendaj; sed dum aŭtuno 2006, mi estis preta rezigni kiel Komitatano A pro la malĝentilaj diskutoj. Tamen, kiam mi kelkfoje estis petita fariĝi kandidato por la venonta estraro de UEA, mi decidis ke eble mi faris pli bonan laboron ol mi supozis. Mi estis honorigita poi la peto sed devis rifuzi pro aliaj respondecoj.

Lusi Harmon
Komitatano A reprezentante ELNA-n